

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIJO

marto - aprilo 2005 • numero 74 | volumo 13 - numero 2



**Adelajdo:
La Somerkursaro de 2005**

ISSN 1039-9380

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA
ESPERANTO-ASOCIOJ

Numero 74 • Vol 13.2 • Marto–Aprilo 2005

Redaktoro: Donald Broadribb

ELDONADO

Ĉi tiu numero estis preparita de Donald Broadribb, per komputilo iMac, per uzo de la programo Pages, kaj la tiparoj Futura, Onyx kaj Times New Roman.

ABONOJ KAJ PASINTAJ NUMEROJ

Libroservo de AEA

143 Lawson St

Redfern NSW 2016 • Aŭstralio

libroservo@esperanto.org.au

Pasintaj numeroj ankaŭ surrete elŝuteblas el:

<http://www.esperanto.org.au/>

La Suda Kruco estas aŭtomate sendata al ĉiuj membroj de AEA kaj NZEA — pliaj informoj ĉe la lasta paĝo de ĉi tiu eldono.

Esperanto Sub La Suda Kruco

P. O. Box 643

York WA 6302

Aŭstralio

☎ (08) 9641 1937 • 📠 (08) 9641 1134

sudakruco@westnet.com.au

Pri la opinioj aperantaj en ĉi tiu eldonaĵo respondecas la aŭtoroj. Ili ne nepre spegulas la opiniojn aŭ de AEA, aŭ de NZEA.

©2005 AEA & NZEA. Ĉiuj rajtoj rezervitaj.

En Ĉi Tiu Numero

- La 2-a Esperanto-Somerkursaro de AEA p.4
Somerkursaro (*Franciska Toubale*).... p.4
Libroservo, nova honora membro, manko de raporto pri la kongreso p.5
Somerkursaro 2005 (*Ŝandor Horvath*) p.6
Bela T-ĉemizo por vi..... p.7
Somerkursaraj eksperimentoj (*Marcel Leereveld*).....p.8
Ili sukcese provis ĉiujn erarojn (*konkursa novelo de Franciska Toubale*).....p.9
Skribas la legantoj (*Oiver Mazodze*).p.11
Eksteren (*Informas Katja Steele*)..... p.11
Deziras korespondi.....p.12
Zamenhofa festo en Viktorio p.12
Peto de la prezidantop.14
Recenzas la redaktoro..... p.15
Interlinguistics and Esperanto Studies: Paths to the Scholarly Literature
La kastelo de vitro
The Hidden Perverse Effects of the Current System of International Communication
Filmorecenzas: “La pasiono de la kristo” (*Tony Peterson*)..... p.17
Korektoj..... p.18
For the Beginner (the use of -n) (*Donald Broadribb*)..... p.19
Pri nia “Konkursa nefacila” p.20
Interrete.....p.20
Radio 3ZZZ.....p.23
Ankaŭ nia historio: Katja Steele intervjuas Terry Manley-n p.23
Odlo Bokserp.....p.25
AEA financa raporto ĝis 30 junio 2004 p.26

LA 20A ESPERANTO-SOMERKURSARO DE A.E.A.

La Somerkursaro estis eĉ tre sukcesa, se oni pretervidas kelkajn etajn aferojn, kiuj fakte ne koncernas la organizan komitaton, sed la estrojn de Kolegio Linkolno. Ekzemple ili ne sufiĉe fidis nin, la organizantojn. Ni ne estis — laŭ ili — sufiĉe fidindaj por havi ŝlosilojn al la multaj diversaj konstruaĵoj en la somerlernejo. Estis tro malfacile eniri ien ajn sen ŝlosilo. Sed feliĉe Katja kaj Trevor estas fidindaspektaj, kaj ili havis ŝlosilojn, kiujn ili bonkore kaj volonte pruntedonis al ni, kiam ni ilin bezonis. Tamen ni iom post iom, kaj sufiĉe baldaŭ lernis malfermentadi la pordojn per matoj kaj rubuoj.

La dignaj somerlernejestroj rompis ankaŭ la kontrakton. Ekzemple ni luis la kapelon, kiu estis eĉ tre taŭga loko por la Libroservo. Sed kio vere okazis? Kiam ni alvenis ni vidis, ke tri viroj kun martel-egoj estis malkonstruantaj la kapelon. Polvo kaj malbonodoro estis ĉie, kaj tial mankis unu ĉambro promesita al ni. Ŝajnas ke la somerlernejestroj kaptis la okazon elspezi nian monon por renovigi sian kapelon, ĉar la lastan tagon de la Somerkursaro ĝi estis finriparita. Oni donis kompanse al ni la finan parton de la manĝejo, kie ni povis sidi ĉirkaŭ longa tablo. Tiun parton ni uzadis por la Forumo. Ŝajnas ke tiu Forumo estis eĉ tre sukcesa, kvankam ĝi estis nur unu-foja eksperimento. Okazis dum ĝi dudek malsamaj paroladoj. Unu el la paroladoj meritas apartan mencion. Temas pri tiu de nia juna amiko, Ĵejmzo McInnerney, kiu post nur du jaroj da esperantostudado paroladis pri la maniero de parolado preferata de la junularo. Malgranda sukceso, la Forumo estis iomete riska, ĉar ĝi forprenis de lecionoj tiujn, kiuj interesiĝis

pri la temo diskutota en la Forumo. Se en venontaj Somerkursaroj oni havos Forumojn, ili estu prefere dum la posttagmezoj, kiam estos finitaj la lecionoj. Tio signifas do, ke oni ne povos havi tiom da ekskursetoj, kiom ni vere havis ĉi tiun fojon, sed kvankam nia Somerkursaro povas fieri pri siaj junaj partumantoj, ni tamen devas konsideri ankaŭ la dezirojn de niaj malpli junaj simpatiantoj kaj membroj!

Okazis sukcesa ekskurso al la Montaro Adelajda sabaton la 15an de januaro. Mi parolis kun multaj partumintoj. Io alia, ankaŭ nova eksperimento menciinda estas la tre sukcesa Esperanto-Klubo, en kiu oni preskaŭ neniam parolis la anglan. Tie Katarina bonvenigis ne nur la komencantojn, sed ankaŭ ĉiujn aliajn, el kiuj multaj spertuloj. Ni sidis ĉirkaŭ tabletoj ornamitaj per brulantaj kandeloj. Kiam mi ĉeestis okazis komuna kantado aŭ pup-teatraĵeto. Ĉio estis tre plaĉe kaj amike organizita!

Dum la posttagmezoj ekzercis sin je kantado granda grupo da kantemuloj. Ili distris nin kelkajn vesperojn, kaj ĉiuj ĝuis tion.

Okazis kompreneble ankaŭ kant-kaj dramkonkurso inter la diversaj ŝtatoj aŭstraliaj. Ni gratulas al la gajnintoj, ne gravas kiuj ili estas, ĉar gravas nur, ke ni ĉiuj ekzercis nin pri nia lingvo kaj ĝuis la Somerkursaron!

[El *Tamen Plu*]



SOMERKURSARO 2005

DE FRANCISKA TOUBALE

Ĉeestis la 20an somerkursaron en Adelajdo inter sep- kaj ok-deko da esperantistoj, el ĉiuj aŭstraliaj ŝtatoj escepte de la Norda Teritorio, kiuj ĉiumatene dividis sin inter la klasoj: de Oliver Mazodze el Zimbabvo kaj Trevor Steele por la progresintoj, kaj de Sabine Trenner kaj Franciska Toubale por la komencantoj kaj progresantoj, dum Penny Vos Pym zorgis pri la tri plej junaj infanoj el la somerkursaro.

Estis bone vidi dek sep komencantojn kaj dudek sep entuziasmulojn en la dua nivelo je la unua mateno, sed iom post iom ĉiu trovis por si la plej taŭgan klason.

Dankon al Saani Bennetts, kiu instigis instruistojn el Okcidenta Aŭstralio al lernado de Esperanto, kun la celo instrui ĝin poste en siaj klasoj. Pro tio ke ili ricevis stipendion, ili tre serioze studis kaj strebis paroli kaj dum la manĝoj kaj dum la ekskursoj, stimule la kunlernantojn per sia vikleco. Krom la eksterlandaj instruistoj, la ĉeesto de tri aliaj fremdlandanoj (Claude el Francujo, Viola kaj Mako el Japanujo) kreis la ĝustan etoson por ke esperanto estu uzata laŭ la Zamenhofa intenco, tio estas inter homoj de malsamaj deveno kaj lingvo. Tiel Adelajdo fariĝis nefavora tereno por krokodiloj.

Krom la kutimaj aktivadoj aldoniĝis forumo kadre de kiu iu ajn povis prezenti ŝatatan temon. La kursanoj pozitive reagis al tiu ero. Estis pritrakitaj tre diversaj temoj.

La vespera klubo estis bona loko por iom ripozi post la vespemanĝo, kantante kaj trinkante kune je kandellumo.

Dank' al la diligenteco de Katja Steele aperis kvar numeroj de la somerkursara gazeto *Plu, Plu, Plu* en kiu la kursanoj povis sin libere esprimi kaj disvastigi siajn fotojn.

La plej kuraĝaj ne hezitis trapasi ekzamenojn sub la gvidado de Marcel Leereveld. Apartan gratulon al James McNerney, juna adelajdano, kiu sukcese trapasis la mezan nivelon.

La vigla etoso de la bankedo estis kaŭzita ne nur de la aŭkcio favore al Zimbabvo kaj Hindio, sed ankaŭ de la ĝojo esti kune en amika rondo.

La tuta aranĝo estis certe tre bone preparita de teamo de pli ol dek homoj, kiuj proponis riĉan programon, tiom diversan kiom la personecoj de ĝiaj membroj. Tio kaj la ĝenerale alta nivelo en la uzo de esperanto iom mirigis la eksterlandajn ĉeestantojn. Ni esperu ke estonte ni ree kapablos organizi efikan kaj amikecan somerkursaron, kun kaj seriozaj kaj amuzaj flankoj.

LA ESPERANTO-FORUMO

Dudek prelegoj/prezentadoj/diskutoj:

Centjariĝo de Esperanto en Aŭstralio (Terry Manley),

Ĉu Esperanto progresis en Aŭstralio dum la lastaj 100 jaroj? (Marcel Leereveld),

La Cseh-metodo kaj la Internacia Esperanto-Instituto en Hago (Katja Steele),

Normandio (Claude Ferrand)

Historio de UEA (Trevor Steele)

Malnovaj rozoj (Margaret Furness)

Mondo nur angla-lingva (Sandor Horvath)

La renaskiĝo de la maoria lingvo (Bradley McDonald)

La danĝero de viandomanĝado (Bob Felby)

Ĉu esperantistoj traktas esperanton nur kiel ludajon? (Marcel Leereveld)

Energio — Novaj pensmanieroj pri la uzado de energio (Anthony Gaskin)

Morto-Fino—filozofia Disputo pri morteco kaj fineco (Pasterĉjo)

Vojo el konfliktoj (Sabine Trenner)

Gestolingvoj - Multaj pensas ke surduloj uzas la saman lingvon tra la mondo. (Miranda Lutz),

Esperanto-agado en Indonezio. Kion ni faros en 2005? (Diano Lukes),

Papertranĉado — Venu kaj lernu tiun ĉinan arton (John Abood),

Aruba – kie ĝi diable estas? (Indrani Beharry Lall),

Ĉu ni bezonas “junostilon” por junuloj en Esperanto? (James McInerney),

Mia vivo kun blinda edzo (Katherina Taggart),

Nova militarismo en Japanio (Viola Ando)

La diskuto ĉu la forumo devis okazi ne dum la matena instruada tempo verŝajne daŭros “ĝis la bovinoj venos hejmen”¹.

[Komento de Ŝandor Horvath] □

LIBROSERVO

Por mendi librojn kaj por aboni gazetojn, sendu, kiel antaŭe, viajn dezirojn al:

Libroservo de AEA
c/- 143 Lawson St
Redfern, NSW 2046

aŭ rete: libroservo@ans.com.au

La libroservisto por 2005 estas S-ino Nicole Else, kiu estas vokebla per la telefonnumero (02) 9319 4775, sed nur merkrede inter 10atm kaj 12-tagmeze.

NOVA HONORA DUMVIVA MEMBRO DE AEA

Dum la jarkunveno la estaro kaj membraro elektis Profesoron Robbie Robertson kiel honoran dumvivan membron de AEA por rekoni lian laboron. Robbie estis prezidanto dum ok jaroj: 1972-1980.

[Laŭ *Telopeco*]

MANKAS KONGRES-/KUNVEN-INFORMOJ

Ĉar neniu raporto pri la kongres/jarkunveno atingis nin antaŭ la limdato. Espereble os-e.

¹ Anglalingva esprimo = eterne

SOMERKURSARO 2005: STIPENDIO KLUBO, FORUMO

DE SANDOR HORVATH

La 20-a somerkursaro venis kaj pasis. Jen miaj pensoj pri ĝi. Kiel unu el la organizantoj mi ne povas taksi ĝin “neŭtrale”, ĉar mi konscias pri kio ni ne sukcesis kaj samtempe ne estas tiel facile laŭdi sin mem. Mi ankaŭ komprenas ke la vidpunkto de ‘simpla’ partoprenanto estas tute alia.

La alveno de Katja kaj Trevor Steele en Septembro certe injektis novan energion kaj ideojn en la preparado de la kursaro. Ni esperas ke ili restos en Adelajdo por kelkaj jaroj.

Post longa diskuto, ni decidis inviti instruistojn el “malriĉaj” landoj, kvankam tio estas multe pli da laboro kaj signifas pli da elspezoj. Ni sukcesis kun Oliver el Zimbabvo, sed la vizpeto de Volodimir el Ukrainio estis rifuzita dufoje,... per la sama rifuzletero. Ŝajnas ke oni sendas tiun leteron al (preskaŭ) ĉiuj.

Tamen estis alia memorigo pri kiel privilegiitaj ni, en la okcidentaj landoj, estas, kaj ke la esperanto-mondo nur spegulas la ‘realan’. Kelkaj homoj opiniis ke ne valoras inviti eksterlandanajn



Teatraĵo: Claude Ferrand,
Viola Ando, Oliver Mazodze



Merradean Petit kaj Oliver Mazodze

instruistojn ... la eksterlandanoj kostas multe kaj ili kutime ne invitas unu el ni por instrui en aliaj landoj. Tamen, tiuj eksterlandanoj aldonas multe da koloro kaj internacieco al la kursaro. Kaj Oliver kaj Sabine certe faris ĝustetion.

La organizantoj de venontaj kursaroj devas decidi kiel solvi tiun ĉiujaran problemon.

Ni klopodis enkonduki novajn programerojn kaj mi pensas ke ni pli aŭ malpli sukcesis.

La Esperanto Klubo, kie precipe komencantoj povis kunveni kaj ĝui malstreĉan etoson.

Mi nur bedaŭras ke aliaj ŝtatoj (inkluzive de nia) ne sukcesis allogi instruistojn.

Kompreneble ni havis pli grandajn planojn: starigi junularan forumon, havi malferman tagon por la ĝenerala publiko, okazigi ekspozicion en la urb-domo, havi pli da kontaktoj kun la amaskomunikiloj, ...sed ni faris kion ni povis.

Krom la tutgaja ekskurso, ĉiuj ekskursoj estis senpagaj kaj ni bone uzis la interesojn de niaj lokaj membroj: komuna

ĝardeno, komuna domo, marborda promenado.

Preskaŭ ĉiuj komentoj de la partoprenantoj estis pozitivaj. Bonŝancon al Penny, Paŭlo kaj iliaj amikoj pri la organizado de nia venonta kongreso/lernejo en Mirimbula en Januaro 2006. Subtenu ilin

dum la preparado kaj venu!

Alia pinto estis la aŭkcio dum la bankedo. Ni gajnis pli ol \$800 por la esperanto-movado en Zimbabvo kaj Hindio. Entute ni elspezis \$5000 pli ol ni enspezis. □

BELA T-ĈEMIZO POR VI

La surfote videblaj Cathy kaj Brendan el Adelajdo surhavas esperante verdan T-emizon, produktitan precipe por la partoprenantoj de la 20-a Aŭstralia Esperanto-Somerkursaro. Kelkaj el la ĉemizoj ankoraŭ haveblas — en grandecoj S, M, L, XL. Se vi ŝatus



iun el ili havi, bonvolu kontakti Indrani Beharry-Lall La prezo estas \$15 + la sendokostoj. Preferata estas pago per ĉeko, adresita al S.A. Esperanto Society. Sugesto: la komunaj mendoj ekz. klubaj ŝparas en la sendokostoj. Adreso:

indrani_BL@hotmail.com, tel. +61 8 8268 4021.



La Somerkursanaro

SOMERKURSARAJ EKSPERIMENTOJ

LAŬ INFORMOJ DE MARCEL LEEREVELT

La ĵusa adelajda somerkursaro estis refoje granda sukceso, kiel vi legos en aliaj raportoj en *ESK*. Ĝia formo estis tamen iom malsama ol pasintaj kursaroj, pro kelkaj eksperimentoj pri la uzo de la tempo havebla. Ni devos serioze diskuti ĉi tiun novaĵon, por daŭre plibonigi niajn somerkursarojn.

La unua estis la enkondukiĝo de la Forumo. Ĝi okazis ĉiutage dum la dua parto de la mateno, do dum samtempe okazis ĉiunivelaj klasoj. La partoprenantoj, kvankam ĉiutage nesamaj, do ne ĉeestis tiujn klasojn de niveloj 3 kaj 4, kiuj kelkfoje duoniĝis. La enhavoj de la Forumoj estis ĉiam tre interesaj kaj kreis viglajn diskutojn. Pro tio ni povas diri, ke ili estis sukceso. Sed la fakto, ke ili tiam fortiris ĉiutage alian grupeton de klasanoj el niveloj 3 kaj 4, estas nekontentiga. Pluraj kursaranoj do proponis, ke estonte la Forumo okazu posttagmeze.

La dua “eksperimento” estis organizi ĉiun posttagmezon ekskurson. En antaŭaj kursaroj ni havis nur unu aŭ du, sed nun subite preskaŭ dek. La efiko estis forta: la ekskursoj eltiradis gesamideanojn el regulaj lecionoj kiaj la ekzamenopreparoj. Samtempe mankis la riĉa varieco de antaŭaj posttagmezaj elektoj kiaj ludoj, krececa verkado, individua helpo al komencantoj, ktp. Ĉi tiuj normale estas multe pli lingvintensaj ol la ekskursoj, sed la partoprenantoj evidente preferas uzian organizon ankaŭ kiel turisman agentejon. Tamen estas konsilinda, ne tiom tro-

igi la kvanton de ekskursoj en la estonteco; eble ĉiun duan tagon. Aŭ eĉ malpli, se la Forumo okazos posttagmeze, kiel verŝajnas.

La tria novaĵo estis la starigo de “Esperanto-Klubo” en la vesperoj, parte samtempe kun la normalaj aranĝoj kutime tute en esperanto. La tialo estis, ke oni timis ke la komencantoj kaj infanoj kaj malfortuloj ne povas toleri la tutan tempon aŭdi nur esperanton ne sufiĉe ĝin komprenante, kaj pro tio bezonas “pli facilajn” aranĝojn. La organizantoj devis malgravigi ĉi tiun eksperimenton, ĉar ili forgesis enmeti en la posttagmezon la ekzamenopreparojn por la Baza, kiuj tial devis okazi de la sepa ĝis la oka (tro mallonge!), antaŭigante la komencohoron por la vesperaj aranĝoj al la oka horo. Cetere neniu el la komencantoj plendis pri iu suferado aŭdante tro da esperanto, do verŝajne ĉi lasta eksperimento ne daŭrigindas. Aŭ de la sepa ĝis la oka ni povos organizi interparoladojn inter komencantoj kaj spertuloj, do kiel specon de daŭrigo de la matenaj klasoj sed ne strukturitaj kaj pri certaj temoj proponataj de la komencantoj.

EN LA SOMERLERNEJO

partoprenis 72 plenkreskuloj kaj 8 infanoj. El eksterlande venis 5 personoj: Oliver Mazodze (Zimbabvo), Sabine Trenner (Germanio), Claude Ferland (Francio).

Bradley McDonald kaj Benita McDonald (Novzelando)



[Laŭ *Teloqueo*]

ILI SUKCESE PROVIS ĈIUJN ERAROJN

ŜERCA RAKONTO DE FRANCISKA TOUBALE

(Rakonto premiita en la “Nefacila Konkurso” 2004)

Elie kaj Kirie naskiĝis preskaŭ samtempe sur fora, fora planedo, la *Rozkolera Aŭroro*. Ĝi tiel nomiĝis pro unu el ties praloĝantoj, kiu eniris la mondon neatendite ĝuste iun aŭroron, moviĝante kaj kriante kiel nur teranoj povas fari. Lia vizaĝo anstataŭ ruĝiĝi, konservis sian mildan rozkoloron, malgraŭ tiom da ekscitiĝo. Fakte ĉio sur tiu planedo estas milda: la klimato, la manĝaĵoj, la konduto de la Aŭroranoj. Pro tio la vivo en Aŭroro estas antaŭvidebla kaj kvieta.

Kiam Elie kaj Kirie fariĝis adoleskaj, kreskis en ili emo je aventuro. Iamaniere ili konsciis ke devas ekzisti alia mondo ne tiom trankvila, pli alloga. Ĉu la eksterordinare malica patrino de Kirie helpos ilin? Alveninte la verandon, ili vidis ŝin, kiu trankvile *rastis la karoton por la barĉo*, kantante aŭroran melodion por ritmi la monotonan movon de la rastilo Estus krimo ŝin interrompi: la karota barĉo estas la oficiala ĉiutaga donaco al la dio Oogedo, la protektanto de Aŭroro.

“Ah, kompreneble, al la templo!!” ekkriis samtempe Elie kaj Kirie. Ili tuj kuris al la altebenaĵo de kie eblas trarigardi la tutan planedon. Tie sidas tage kaj nokte Kebralto, la interpretisto de la signoj. La du amikoj ekkaŭris en la ombro de iu roko kaj atendis.

“Desubantaŭ, kunpostpersenje, interalensurpro...” psalmis la dIvenisto, dum Elie kaj Kirie estis rigardantaj unu la alian kun iom da senpacieneco.

“Mi komprenas kial neniu deziras

labori kun li” flustris Elie

“Jes, mia patro diris al mi ke Kebralto estis sendita sur tiun pinton ĉar li *havis kutimon esprimi sin per longaj, multvortaj, bizaraj prepozicioj*. Tio tiom timigis la bestojn ke la inoj ne plu povis produkti lakton por siaj idoj. Post kunveno de la maljunuloj.....Ahhh!”

Kirie ne povis fini sian rakonton. *Certe lia parolo estis kurba kaj konvinka*, sed li forgesis ke nur aludi al tiu neglora epizodo, eĉ per *simplaj kaj apelitaj literoj*, kaŭzas katastrofon. Forta kirlovento forpuŝis lin, suprenblovante tiom da polvo ke kompatinda Kirie malaperis el la vido de Elie, kiu daŭre meditis pri la *interuladaj pretendoj* de Kebralto kaj ne konsciis ke granda danĝero trafis ŝian kunulon.

Kirie provis lukti, fariĝis kiel eble plej peza, etendis la manojn en la espero trovi ion al kiu li povus sin alkroĉi. Vane. Kvankam *fiere spiris la bruto de la venkinto*, lia rapida vertiĝodona vojaĝo tra la steloj kaj nuboj kondukis lin sur pecon da grundo konsistanta el griza ŝtono, kiun li neniam antaŭe vidis. Plie ĝi estis tiom ebena ke li ne povis kredi siajn okulojn Kiel li povus scii ke li surteriĝis meze de Viktoria bazaro, jes en la koro de Melburno, li, kiu neniam antaŭe vidis ion ajn kiu similas al la inventaĵoj de la teranoj? Antaŭ ol li povis tuŝi tiun grundon, li subite ŝetis siajn membrojn super siajn kvar aŭdotruojn pro apuda forta teda bizara bruo, kiu preskaŭ frenezis lin. Tiam li rimarkis malhelan tubon, taŭgan lokon

por sin kaŝi, kaj tuj ĝin eniris. Kaj tuj ĉesis la bruo. Fakte li eniris diĝeriduon, trovis la lokon komforta, kaj endormiĝis.

Kion fari per silenta muzikinstrumento? Charley malrapide ekstaris kaj kun la diĝeriduo sub la brako, iris al trinkejo, pensante ke tio estas signo por biero-tempo. Poste li konsideros la problemon. Estis ankoraŭ tro frue por renkonti la kutimulojn, do li elektis eksteran tablon en fora angulo, pacan rifuĝejon.

“Ĉu ekflamigi cigaredon nun? Vespre dum koncerto haŝiŝo bone efikas, sed tie en bruo kaj varmeco... kaj mi devas plu ludi, se mi ne deziras perdi la lokon,” pensis Charley. ...

La muzikisto komencis skui sian muzikilon. John, kiu kutime ludas gitaron en la ĉirkaŭaĵo, vidis oportunon provi la deziregitan instrumenton, plie kun la konsililoj de spertulo. Li proponis sian helpon. Per bastono, li puŝis eksteren la blokaĵon kaj blovis kiel eble plej forte tiel ke Kirie trovis sin ree sur la asfalto. Ne pensu ke la muzikistoj estis senkoraj homoj. Ili regule kaj serioze tie ludis por akiri iom da mono. Ili sciis ke la konkurado sabate estas severa. *Ilin ege timiĝis neatendita blago* kaj post kvietigo, ili rekomencis plezurigi la pasantojn per sia arto.

Kirie ne tre ŝatis la brutalan surasfaltiĝon. Kvankam neniu parto de li rompeblas ĉar la aŭroranoj ne havas ostojn kiel la teranoj (ili pli proksimas al la fiŝoj) liaj muskoloj suferis. *Elspezinte lastan doloron, li ĉagreniĝis kaj ekskuiĝis laŭ la aŭroramano* per esprimi sian malĝojon.

Helen, dujara knabino, kiu enuis, atendante dum la patrino senfine babilis kun de ŝi nekonata viro, rimarkis tiun skuaĵon. *Per mola karesema bateto*, ŝi provis ekamikiĝi. Ŝi metis la fingrojn en la multenombrajn aperturojn de Kirie, es-

plorante lin kun delekto kaj demandante sin ĉu *ĉi tiu bazara bubo bezonis riparon*. Ŝi dividis sian manĝon kun li kiel lasta gesto de nobleco. Lin ege ĝojigis ŝia salato sur la strato. Dume la plenkreskuloj daŭrigis sian diskuton pri la laborkondiĉoj. Sabato estas feritago, tamen spirite ili ne forlasis la oficejon:

“*La estro volonte simulis ajnan bonan iniciaton de la kunlaborantoj*, sendube pro tio la kompanio estas modelo de demokratio”, diris li.

“Ne forgesu ke *lia granda liberkapablo estis mirinda por la kunlaborantoj*”, ŝi intermetis.

“Tamen *lia eta filio estis trista*. Estas konsilinde dungi internaciajn spertulojn kaj perantojn En moderna entrepreno *sango de la prezidento* ne devas okazi.” li aldonis

Tiam la okuloj de la patrino fiksiĝis al la malproksimo, ŝia buŝo prenis la formon de O, sed nenion eligis. Scivoligite, la viro demandis:

“Kio okazas al vi?”

“Mia edzo, mia edzo fariĝis senhara, senbarba. La razisto forrabis lian barbon. Li malsukcese vetis. Li aspektas terure. Ni estas perditaj.”

Ŝi prenis la manon de Helen, kuris al la aŭtomobilo kaj ekveturis kiel bankarmilatakiŝto for de la urbo. En sekundo ŝi decidis forgesi sian ĝis nun burĝan vivon kaj eskapi en la naturon kaj savi sin kaj sian filineton

Helen sciante ke Kirie sekure ripozis je la fundo de sia poŝo sentis ke ŝi nun povis postvivi ion ajn. Kirie ne povis resti trankvila. Li ofte deliris ŝin vidi. En la fundo de lia koro estis la timo: ĉu ili kune sukcesos atingi Rozkoleran Aŭroron? □



• skribas la legantoj

De Oliver Mazodze:

Adelajdo, la 22-an de januaro, 2005.

Dum la 20-a Aŭstralia Esperanto-somerkursaro (AESK), mi rimarkis, ke la Aŭstralia esperantistaro ĝenerale tre entuziasmas pri la internacia helplingvo. Konstituigas la esperantistaron plejmulte plenkreskuloj, male al la zimbabva esperantistaro, kiun konstituigas ĉefe gejunuloj, grandparte lernantaj en lernejoj aŭ universitatoj.

Miaopinie, dezirindas, ke estu pli da gejunuloj en la movado, ĉar estas la gejunuloj, kiuj ĝin daŭrigos. (Komprenoble,

la pli aĝaj plenkreskuloj, kiuj verŝajne laboras, kapablas pagi kotizojn aŭ fari financajn kontribuojn al la movado, kion ne kapablas fari la gejunuloj, ankoraŭ lernantoj).

La esperantistoj aŭstraliaj, kiujn mi renkontis dum la 20-a AESK, estas ege afablaj, amikecaj kaj gastigemaj; ili ne nur scipovas nian karan helplingvon, sed ĝin fakte uzas por efektiviĝi fratecon kaj amikecon inter la popoloj, kio, mi kredas, estas efika plenumo de unu el la celoj/revoj de la iniciatinto de nia lingvo. Mi sincere gratulas al AEA kaj la tuta aŭstralia esperanto-komunumo. □

EKSTEREN

INFORMAS KATJA STEELE

La 20-a Aŭstralia Esperanto-Somerkursaro donis signifan kialon por provi informi pri esperanto la neesperantan publikon.

La plej frua informo pri esperanto estis la intervjuo kun Trevor en la antaŭtagmeza “Ray Fewings Show” en Radio 5DN ankoraŭ pasintdecembre. Ĝi ŝuldiĝis al la laboro de Bob Felby.

La 7-an de januaro Sandor Horvath aranĝis intervjuon ĉe Radio Adelaide. La matenan konversacion en la studio partoprenis krom Sandor ankaŭ Trevor Steele kaj Oliver Mazodze el Zimbabvo.

Margaret Furness sendis informojn al kelkaj ĵurnaloj kaj programoj, sed ne venis reago. Tamen, surprize, ŝi mem ricevis frumatenan telefonvokon de la “891 ABC- radio” kaj estis intervjuita, komprenoble pri Esperanto.

La loka *The Advertiser* sendis sian fotiston al la kursaro, sed neniu venis por fari intervjuon. La mankon propramaniere solvis unu el la adelajdaj partoprenantinoj de la kursaro: Gloria Bristow. Ŝi mem skribis leteron por la leterkesto de la ĵurnalo kiu, sub titolo: “Esperanto, the language of the world”, aperis la 28-an de januaro.



• deziras korespondi

Komputilisto en komerca entrepreno ŝatus korespondi pri kulturo kaj ĝenerale pri la vivo en Aŭstralio:

Evis Rodriguez Bory, 15 Norte % 5 y 6 Oeste, Edific: 26. Apto: 162 B. Rato Caribe. C.P: 95200, Guantanamo, Kubo.


ZAMENHOFA FESTO EN VIKTORIO

RAPORTAS FRANCISKA TOUBALE

La Esperanto-Federacio de Viktorio festis la naskiĝtagon de Zamenhof sabaton la 11an de decembro 2004. Dank' al la klopodoj de Henry Broadbent la kunvenĉambro de la biblioteko Carlton fariĝis nia kunvenloko.

Babilante, ni unue kune gustumis la bonajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn alportitajn de ĉiu ĉeestanto.

Poste ni aŭskultis la festparoladon de Svetislav Kanaĉki, kiu malkovris por ni la strangajn situaciojn, en kiujn esperanto metis lin: ekzemple kiam li devis trovi la lokon en



Svetislav Kanaĉki parolas



Bernie Heinze, Marcel Leereveld, kaj Franciska Toubale prezentas "La elekton" de Trevor Holton. — Fotis John Adams

Gipslando, kie vivas longaj vermoj, por kontentigi scienciston venintan en Aŭstralion por ĉeesti kongreson pri sia fako — marvermoj.

Ŝajnas ke la zamenhofa festo estas la ideala okazo por cerbumigi la viktorianojn. Tion faris Trevor Holton per kvizo pri ĝeneralaj geografiaj konoj, bona stimulo por la esperantistoj kiuj kutime estas vojaĝemuloj. Pli malfacile estis kompreni la sencon de la enigmaj ciferoj elpensitaj de Henry kiuj ĉirkaŭis la verdan stelon sur la kuko bakita de Betty Broadbent. Ili rilatis al la vivo de Za-

menhof kaj kelkaj leĝaj ŝanĝoj koncerne la judojn tiam. Sed mi ne certas, ĉar la matematika kono malantaŭ tio superas min. La gajninto de ĉiu kvizo ricevis ekzempleron de la libro ĵus eldonita de SAT *Vivbruligita*, kiu atentigas la homojn pri la graveco de honorkrimoj.

La teatraĵeto “La elekto”, satiro pri la antaŭnelonga voĉdono, verkita de Trevor Holton, estis prezentita kiel vivigita legado.

Kantado sub la gvido de Suzanne Holton kun akompano de Alan Bishop per gitaro fermis la vesperon.

Estis bone vidi kelkajn vizaĝojn almenaŭ unufoje en la jaro, aŭ malkovri no-

vajn vizaĝojn. Tamen mi bedaŭras ke dum la Zamenhofa festo, je mia alveno en Melburno antaŭ dek jaroj, venis preskaŭ kvindek homoj, nun ĝi arigas apenaŭ dudekon. Tio en urbo de tri milionoj kaj duono da loĝantoj!

En novembro 3ZZZ havis vizitantojn el Toronto en Kanado: Alica kaj Tom Kazimirowski. Ili restis en Melburno tri tagojn, kaj ni invitis ili al la tagmanĝo antaŭ la komenco de 3ZZZ-esperanto-programo. Ni aranĝis ke venu ankaŭ komencantoj, por ke ili havu por la unua fojo oportunon renkonti eksterlandajn esperantistojn.

[Raportis Svetislav Kanaĉki]

🦋 por ridigi vin 🦋

Interparolo

“Vi nur tiam estas al mi afabla, kiam vi bezonas monon!”

“Sed, karulo, mi ja ĉiam estas afabla al vi...”

“Bedaŭrinde!”

Moderna miraklo

“Admirindan aferon mi vidis hodiaŭ! La antaŭa parto serpento, la malantaŭa krokodilo!”

“Neeblaĵo! Kie vi estis, ĉu en la akvario?”

“Ne! En ŝuvendejo!”

Vivbazo

“Diru al mi, Johano, el kio vi vivas, ĉar vi ja tute ne havas ian profesion?”

“Se mi bone pripensas, ankoraŭ ĉiam el tiu florpoto, kiu dum la printempo falis sur mian kapon.”

Superflua

“Mi volas aĉeti trinkvazon por mia hundo.”

“Bonvolu, sinjorino! Jen tre taŭga plado! Eĉ la surskribo staras sur ĝi: “La trinkilo de la hundeto”, por ke hazarde oni ne uzu ĝin por alia celo.”

“La surskribo estas superflua. Mia edzo neniam trinkas akvon, kaj mia hundo ne povas legi.”

[El *La ondo de esperanto*]

PETO DE LA PREZIDANTO

Eĉ en esperanto-asocioj estas malfacila por la homoj, esti ĉiam objektiviĝaj, ne-emociemaj, kaj si-ofereblaj. Eĉ ĉe ni ni renkontas aliancetojn pro simpatioj neniel rilatantaj al esperanto, kaj membrojn kaj grupetojn de membroj kiuj, konscie aŭ ne, de tempo al tempo forgesas agi por la bonfarto de nia Asocio pro propraj ideoj subjektivaj. Ni renkontas individuajn membrojn kiuj nekonscie ofendas, kaj aliajn kiuj sentas sin, ĝuste aŭ ne, ofenditaj de aliaj membroj. Kelkaj el la lastaj eksigigas el AEA, aŭ ne plu same aktivis kiel antaŭe. En nia aŭstralia kulturo ni penas forte subpremi la publikigojn de tiaj malagrablaj, eĉ kelkfoje malsanaj, situacioj. Se temas pri lingvismaj malakordoj, ni ne hezitas akre ataki aliiies opiniojn, ĉar kompreneble ni ne celas ofendi la personon (kiun ni ofte samtempe tre ŝatas), nur la opiniojn (vidu multajn tiajn “ofendojn” en *ESK!*). Sed se temas pri opinimalakordoj pro persona karaktereco, ni emas ŝajngi ke ni estas superhomoj kaj neniam havantaj konfliktojn. Eble pli utilus, se ni estus pli malfermaj kaj honestaj pri tiuj subjektivaj malakordoj, ĉar laŭ

mia sperto en AEA (dum preskaŭ duona jarcento) la kaŝitaj malamikaĵoj ne foriras kaj ofte eĉ pliiĝas. Kaj mi ne troigas: ankaŭ mi mem ricevis mian porcion de malsimpatiado (ĵaluzo?) de valoraj kaj regemaj membroj. Aliflanke mi havis la ŝancon kaj devon kaj sukceson, kiel prezidanto de AEA en 1965, interpacigi, por AEA laboregantajn, membrojn alie certe eksigontajn el AEA pro tiamaj kvereloj (temas pri tiuj en Ŝidnejo kaj en Laŭncestono kontraŭ en Melburno).

De tempo al tempo novaj malakordoj stariĝas. Ili malutilas al la asocio, kaj eĉ pli se ili okazas publike. Mi urĝe petas niajn membrojn solvi siajn malakordojn inter si, ne publike, aŭ peti iun Estraronan psihologe helpi en la forigo ante la malamikecon aŭ la malakordon. Vi ja elektis la Estraronajn parte pro tiu kapablo. Kiel via prezidanto mi estas ĉiam preta solvi aŭ almenaŭ malpliigi la malharmonion. Cetere ĝi ofte baziĝas sur nuraj miskomprenoj.

Mi esperas vian kunlaboron pri tiu problemo.

Marcel Leereveld □

por ridigi vin

Per malgrundaj paŝoj

Sen grunda investo, startigi vian propran komercon... (*Heroldo de Esperanto* 1994: jun)

Rondo familia

La biografio enhavas interesajn informojn pri la (tute negativa) sinteno de tiu verkisto [Orwell] rilate al Esperanto, kaj al Lanti, fama franca esperantisto kaj fondinto de SAT, kiu estis onklino de Orwell. (*Facila*: suplemento de *Brazila Heroldo*. 1993:3)

Ne al glavo!

Se ni ne sangigos, ni restos periferia, relative malgranda kaj malgrava satokupa movado. (*Esperanto en Pollando* 1994: 7-8)

Novtipa (?) Esperanto-aranĝo

... la Nord-Amerika Junulara Tedumado... (*La Riverego* 1994:36.)

[El *La ondo de esperanto*]

• recenzas via redaktoro

DETLEV BLANKE: *Interlinguistics and Esperanto Studies: Paths to the scholarly literature.* Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 2004. (Esperanto documents 47A). 40pp.

Scholarly articles on interlinguistics and Esperanto linguistics are scattered in so many places that it is difficult to know where to look. This booklet gives information on collections and bibliographies for such scholarly research.

JOHN FRANCIS: *La kastelo de vitro.* Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 2004. 197 paĝoj. Broŝurita.

Takso: 🍷🍷🍷🍷🍷



John Francis (1921) estas la aŭtoro de tri originalaj romanoj en Esperanto, du novelkolektoj, kaj pluraj poemkolektoj. Ĉi tiu estas lia unua porinfana romano — kaj min tre plezurigis ĝia legado.

Du infanoj, knabino kaj knabino, kies aĝoj ne estas donitaj, dum sia somera ferio akcidente trovas la enirejon de nova mondo, la mondo de Reva.

Post sia traĭro de la enirejo, ili trovas sin en iom luksa sed tute senhoma kastelo. En ĝi vere interesa estas nur mapo. Scivoleme, ili decidas elekti unu el la lokoj indikitaj sur la mapo kaj promeni al ĝi. Tiel ili renkontas vere tre strangan aventuron, en kiu rolas, i.a., fabela kavaliro kun sia servisto, drako, kaj... Nu, legu kaj vi sciiĝos.

Post la fino de tiu aventuro, la infanoj retroiras en sian propran mondon. Sed

kompreneble ili refaras aventurojn en la nove trovita lando, trifoje, kaj ĉiam ilin trafas tre novaspeca aventuro. Fine ili trovas la sekreton de la ekzisto de la alia mondo; kaj lastafoje elirante, ili vidas ĝian nulliĝon.

Ilustras la verkon pluraj tre konvenaj desegnaĵoj de Francisko Veuthey, kiuj bone kaptas la spiriton de la aventuroj.

Originalaj romanoj por infanoj maloftegas en esperanto; inter ili, malmultas elstaraj verkaĵoj. Kiam mi komencis legi ĉi tiun, mi trovis ke mi maldeziras ĝin demeti, malgraŭ la bezono fari diversajn laborojn. Anstataŭe, mi plulegis...nu, almenaŭ unu aventuron je ĉiu eklego. La aventuroj estas plejparte sendependaj, kvankam ne tute.

Por kiuagaj infanoj la libro plej taŭgas? Nu, la plej grandan plezuron ricevos infanoj kiuj povas mem legi kaj kompreni normalan esperanton. John Francis nek uzas nekutimajn vortojn, nek simpligas siajn stilon kaj vortuzon. Mi rekomendus la libron ĉefe por infanoj 8-12jaraĝaj. Kaj, kompreneble, por infanspirittaj plenkreskuloj kiuj volonte revizitos la mondon de sia infanaĝa fantazio. Se vi amas *Alico en Mirlando*-n kaj *La mirinda sorĉisto de Oz*-on, do jen romano kiu bone gustos al via palato.



CLAUDE PIRON: *The Hidden Perverse Effects of the Current System of International Communication.* Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 2004. (Es-

peranto documents 48A). 15pp.

Evaluation: 🍷🍷🍷🍷

This booklet is a rare gem. Claude Piron is a well known French psychoanalyst and linguist, who has published in Esperanto a number of articles, and a few books, relating to Esperanto.

In this instance, the booklet consists of a speech delivered at the International Youth Forum “Interweek”, Akademgorodok/Novosibirsk, Siberia Russia, 15 May 1994. Because the Forum was held exclusively in English and Russian, this is a slightly modified version of the original speech.

What is remarkable about this booklet is its very sober, realistic presentation of a topic which most people (even Esperantists) give very little notice: that a native speaker of a language is at a vast advantage when talking with people who are not native speakers of that language.

English is often considered the most widely spoken language in the world. A study was commissioned by a British advertising company to consider the feasibility of broadcasting English language advertisements in satellite TV covering western Europe. The result of the study was the discovery that 94% of western Europeans surveyed could not understand an average English text.

Translation — simultaneous or pre-prepared — is very liable to serious errors. One example given is a problem which arose when an English text concerning infant mortality rates was translated into Russian via simultaneous translation.

As far as learning English goes, there is considerable inequality among peoples. Speakers of Germanic languages (Scandinavians, Germans, Dutch) find learning English considerably easier than do speakers of Romance languages (French, Spanish, Italian, and others), whose languages share far less grammatical similarity with English; and at the bottom of the heap are native speakers of Chinese, Japanese, Thai, Korean, etc.

Claude Piron devotes a considerable amount of his text to the reasons why there is so much devotion by people to their mother tongue, and such resistance to a neutral language such as Esperanto. His psychological study is fascinating and — though perhaps I am biased, being also a psychoanalyst and linguist — very insightful. It is an area of study which deserves a great deal of research.

All in all, a valuable booklet, and perhaps it may lead even some Esperantists to rethink the reasons for the need for Esperanto. □

🍷 por ridigi vin 🍷

Blbutaj kanonoj

La Sankta Blbio — nova eldono kun duakanonaj (katolikaj) libroj... (*Pola Esperantisto*. 2004: 4, p. 35)

Kaj Akadamo ekkonis Evon

Se oni pripensas, ke nur 11 procentoj de la inaj esperantistoj momente estas membroj de la Akadamo, oni devas konkludi, ke preskaŭ nenio ŝanĝiĝis ĝis nun.

(“Cez”, <http://groups.yahoo.com/group/femino/message/611>)

[El *La ondo de esperanto*]

FILMORECENZO: LA PASIONO DE LA KRISTO

RECENZAS TONY PETERSON

Ĉi tiu surpriza filmo iam fierigos Mel Gibsonon. Estas filmo kiun li ne bezonas konstante defendi. Laŭ la Biblio, la judoj havis la respondecon je la morto de Jesuo Kristo. Tiam, sed ne nun. Kial estas ankoraŭ granda problemo paroli pri tio nun? Eble la vero dolorigos? Por la unua fojo, la aktoroj parolas en la aramea kaj latina lingvoj. Ĉi tiu fremdalingva dialogo donas al la filmo ion kion neniu alia filmo surbaze de la Biblio ĝis nun havis: senton de laŭtempe bazita vero.

Eĉ sen subtitoloj, la filmo estus impona. La plej multaj spektantoj povus kompreni la filmon sen dialogo.

La sangaj scenoj estas ankaŭ io kion bibliaj filmoj ne havis antaŭe. La perforto estas certe senindulga, sed ĝi neniam vere konvinkas, escepte de tempo al tempo.

Antaŭ ĉi tiu filmo, la ekranversioj de la vivo de Kristo estis puraspektaj kaj la Jesuo Kristo kiun filmuloj amis, estis bonaspekta, feliĉa kaj neniel juda (pensu pri Jeffrey Hunter, la blondulo kun blujaj okuloj en la filmo, “Reĝo de Reĝoj”; aŭ Ted Neeley, alia blondulo, en “Jesuo Kristo, Superstelulo”).

Jim Caviezel koincide havas la saman paronimon kiel Kristo, anglalingve (JC), kaj li havas la samspecan aspekton kiel la Kristo sur la Sankta Mortotuko de Torino, sed portreti Jesuon estas sendanka tasko por kiu ajn aktoro.

